

# ***Kluba Bulteno***

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2015

Sabaton la 29an de aŭgusto

63a jaro

---

## **Kalendaro**

Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

**Mardo la 1a de septembro** (sem. 36) – *tirsdag*

La 100a Universala Kongreso en Lille. Partoprenintoj raportos. *Jubileumskongressen i Lille. Del-takere forteller.*

**Lundo la 21a de septembro** (sem. 39) – *mandag*

La komunuma elekto: rezultoj kaj reagoj. *Kommunevalget: resultater og reaksjoner.*

**Mardo la 6a de oktobro** (sem. 41) – *tirsdag*

Leksikografio kaj vortfarado (vd. p. 3). Ĉu "hospitalo" kaj "trajno" aŭ "malsanulejo" kaj "vagonaro"? *Metoder for å lage nye ord i Esperanto (se s.3): "hospitalo" og "trajno" eller "malsanulejo" og "vagonaro"?*

**Lundo la 19a de oktobro** (sem. 43) – *mandag*

Rifuĝintoj. Kiel plej bone helpi azilpetantojn kaj aliajn rifuĝintojn al bona nova vivo? Ĉu Norvegio akceptu same multajn kiel Svedio (proporcie al la loĝantaro)? *Flyktninger. Hvordan hjelpe asyl-søkere og andre flyktninger til et godt nytt liv? Bør Norge ta imot like mange som Sverige (i forhold til folketallet).*

---

**Ĉu vi havas proponon de temo** por prezento aŭ diskuto en estonta kunveno? Ĝi povas esti E-movada, lingva aŭ socia/ monda.

---

Ni memorigas pri la kluba **Fondaĵo Gustavsen** por subvencii studvojaĝojn precipe de junuloj por serĉi inspiron ĉe la E-movado en eksterlando, sed ankaŭ alian agadon de kiu povos profiti la Oslo-kluba junularo.

*Fra retninglinjene: Støtte gis normalt bare til klubbmedlemmer under 30 år men kan også i spesielle tilfeller gis til andre klubbmedlemmer.*

# OKAZIS

## **Oxford: elitisma universitato (7.4)**

Post unua studjaro en Jordanio Vidar S. nun studas la araban kaj la persan en Oksfordo. Kiel la plej malnova universitato en la anglalingva mondo, ĝi konservas sian elitisman karakteron: 44% de la studentoj venas de privataj lernejoj, kaj ŝajnas neeble tion ŝanĝi. 41 el 54 britaj ĉefministroj studis en Oksfordo aŭ Kembriĝo. Tie oni elektas novajn studentojn ne laŭ normaj fakekzamenoj, sed per propraj intervjuoj. Nun univertataj studentotizoj, jam altaj, anstataŭ esti forigitaj, eĉ triobliĝis. Tamen unu revolucio realiĝis: la porviraj kolegioj akceptas ankaŭ virinojn.

## **Permkulturo en Kostariko (20.4).**

Leif Arne rakontis pri permakulturo kaj pri Kostariko, kie li kaj Douwe restis pli ol du monatojn, laborante permakulture sur ekologiaj bienoj. Temas pri varia kaj daŭripova ĝardena kultivado. Li ilustris sian prezenton per multaj memfaritaj bildoj, kiujn li povis montri per grandega televidilo kiun trovis Cato en laboreja rubujo.

Lingva rimarko: La vorto permdevenas de la anglalingva *permanent*, do daŭra aŭ daŭripova. Ankaŭ permafrosto/ ĉiamfrostoj. Sed la geologia periodo permio devenas de la rusa urbo Пермь.

## **Malnovaj metioj: tradukado (5.5)**

Post formala decido pri elekto de

anstataŭanto en la estraro (kaj konstato ke ne eblas trovi kandidatojn por la aliaj postenoj) ni turnis nin al la tradukado de teksto el kajero pri malnovaj metioj (kiun ni komencis 2. feb.). Ĝi donis bonajn deirpunkton por prilumi stilajn fajnaĵojn en Esperanto, i.a. pri ŝanĝo de vortordo por emfazo de iu elemento.

## **Apogmembroj? (18.5)**

Prepare al la landa kongreso ni diskutis la proponon de Mario M. pri apogmembroj – aŭ, eble pli bone, aparta organizo ekster NEL. Ebla nomo: *Aksjon esperanto*. Pro la nur unufoja kotizo ĝi ne perdos apogantojn, sed iel ĝi unue devos apogantojn gajni. Ĉu anonci varbo-konkurson, kun premioj? Multaj norvegoj simpatias al Esperanto, aŭ eĉ iom lernis, sed ni ne havas kontakton kun ili. Necesos intense varbi inter la publiko.

Poste ni diskutis kaj decidis kiel respondi al diversaj helpo-petoj el eksterlando kiuj venis al la oficejo en la lastaj tagoj.

## **Lingvoj, kafejoj k.a. (2.6)**

Improvizita programo. Asbjørn mallonge parolis pri lingvokafejoj en Oslo, pri la hispana kaj la germana lingvoj. Poste ni iom pludiskutis pri la propono pri dumvivaj subtenantoj traktota dum la Landa Kongreso de NEL. Fine ni rigardis la novan Vizaĝopaĝon de la klubo,

kiun ĵus lanĉis Matias.

### **Esperanto en Afriko (3.8)**

Okaze de vizito de Anita Dagmarsdotter el Svedio ni aranĝis kromkunvenon pri afrika agado, pri kiu ŝi havas longan sperton. Ŝi montris bildojn i.a. pri la 5a Afrika Kongreso en Benino kaj rakontis pri siaj kontaktoj kun – kaj subteno

al – tanzanianoj ekde la 80-aj jaroj kaj sia partopreno en aranĝoj en okcidenta Afriko en la lastaj jaroj.

Kaj eldiras: Vizitante Afrikon unuafoje vi aŭ enamiĝas (pro naturo kaj homoj) kaj ĉiam volas reveni, aŭ male: vi neniam volas reveni (se vi ne eltenas densajn homamasojn, bruon, fremdajn odorojn ... ).

---

## **Korektoj al la dissendita jarraporto 2014**

Vicrevizoro 2014. Vakas.

En 2014 (2013) la klubo havis 49 (54) – **estu 53 (56)** pagintajn membrojn. El ili estis 5 (6) – **estu 2 (5)** junulaj, 1 (1) samdoma kaj 13 (11) dumvivaj membroj de NEL. Neniu nova aliĝis en la lasta jarkvarono.

Aldone unu membro poste (2.7.2015) pagis por 2014.

Mortis dum la jaro: Willie Falck

---

### **Prokrastitaj elektoj mardon 5. majo:**

Anstataŭanto en la estraro. Ellen Dalen (nova).

Kluba reprezentanto en la domkomisiono: Kjell Peder Hoff (reelektita).

Dua estrara anst., anst en la domkomisiono, anst. revizoro: vakas.

---

## **Interlingvistiko**

En nia kluba kunveno mardon 6.10 ni refoje diskutos pri interlingvistika temo, surbaze de artikolo de Federico Gobbo en Revuo *Esperanto* (la 9a, en la aprila numero): Planlingvoj inter leksikografio kaj terminologio.

Li listas kvar manierojn formi vortojn en Esperanto:

1. El nacia lingvo laŭ la **prononco**, ekz.e "ŝerco", de germana *Scherz*
2. El nacia lingvo laŭ la **skribo**, ekz-e "butero", de angla *butter*
3. Rekte transpreni **metaforon**, ekz-e "nubskrapanto", de *skyscraper* (**kalkeo** (< fr. *calque*)).
4. Memstare **forĝi**, ekz. *samideano*, *verdularo*, *enirejo*, *malfermilo*

En nia kunveno ni povos trovi pliajn ekzemplojn kaj diskuti la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la metodoj.

## Ĉu vi rimarkis bonajn afiŝ-tabulojn?

La plej multaj afiŝ-tabuloj, surstrate kaj en butikoj, estas tiel maltaŭge lokitaj ke homoj nur preterpasas tute ne rigardante ilin. Sed kelkaj funkcias – en butiko kie elirantoj vidas ĝin rekte antaŭ si, aŭ ĉe bushaltejo. Tiajn bonajn ni notas kaj kolektas por posta uzado. Bv. helpi nin trovi pliajn!

*De fleste oppslagstavler, i butikker og i gatene, er slik plassert at ingen enser dem. Men det finnes noen som fungerer, f.eks. ved utgangen i butikker eller ved bussholdeplasser. Si fra hvis du vet om noen vi kan bruke.*

---

## Esperanto videblis en la Mela-festivalo

Ankaŭ ĉi-jare ni starigis informbudon en la *Igra*-tendo de la *Mela*-festivalo. Multaj vizitantoj – enmigrintoj kaj norvegoj – neniam aŭdis pri Esperanto aŭ eĉ pri la ideo de planlingvo entute, kaj ili haltetis por legi bazajn faktojn pri Esperanto aŭ preni flugfolion. Ankaŭ kelkaj haltis por scivole demandi kiel E-o fartas hodiaŭ. Kaj ni povis respondi ke kvankam ĉi-jare la afero stagnas, en mondperspektivo (Brazilo, Burundo ...) ni konstatas progreson. Neniu haltis por skeptiki aŭ kvereli, sed ĉi-jare mankis ankaŭ fervoruloj.

DD

---

## Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj kaj konferencoj donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto. Ofte jun(et)aj homoj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 6 al Sinsen.

Vd. pli detale ĵinterrete ĉe [esperanto.no/oslo](http://esperanto.no/oslo) → "vojklarigo".

\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: [oficejo@esperanto.no](mailto:oficejo@esperanto.no)  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).